# Informilo de SES ( SES 通信＃228 ) '22 / 11 / 1

Saluton, SESanoj!

Mi petas pardonon! Antaŭ kelkaj monatoj iun matenon okazis stranga afero en mia domo. Kiam mi malfermis la kurtenon inter la ĉambro kaj la verando, "Ho ve!!!!" mi konsterniĝis! Ĉar la surfaco de la tuta verando estis kovrita per brunaj haroj! Kaj mi ankaŭ trovis tie rompitan balailon, kiu estis farita el ŝelo de parmo. Cetere tiu balailo multe plaĉis al mi. Certe la krimulo estis Korvo! Antaŭ multaj jaroj, kiam mi laboris kiel instruistino de elelmenta lernejo en la urbo Suita, tiam okazis stranga afero: en tiu urbo ĉiuj elementaj lernejoj havis verandojn apud klasĉambroj, kaj tie estis ekipitaj lavejoj. Kaj de la ĉiuj kranoj estis penditaj flavaj sapoj en retaj sakoj. Sed unu tagon ĉiuj sapoj en la tuta lernejo malaperis! Nature ni suspektis niajn gelernantojn, kiuj grumblis, dirante "ni tute ne faris tion! " Post kelkaj tagoj unu mia lernanto, kurante al mi kriis! "Intruistino, mi trovis korvon kun frava sapo! " Poste mi studis pri tio de specialisto pri la korvoj jene : en la sapoj estas miksitaj sufiĉe da oleo, kion la korvoj tre amas. Kaj ili stokas la oleon en la tero. Miaj karaj iamaj gelernantoj! Bonvolu pardoni min, kiu tiam suspektis vin! Sunjo

＃高木理恵さんが初心者講習（担当：後藤純）に参加中、佐藤忠利さんが SES に入会され、例会に参加されるようになりました。会員数が増えるのは嬉しいことです。